Unu tagon, kiam Logan forestis de la tendaro, la aliaj indianaj viroj transiris la riveron kaj venis al la domo de la komercisto. Ĉar tiu ne estis ĉeĥejme, la indianoj rulis la viskiajn barelojn el la domo, kaj trinkinte tiom da la viskio kiom ili povis, permesis ke la restaĵo elfluu sur la teron. Tiam ili kuŝiĝis kaj dormis, estante tre ebriaj. Kiam la komercisto revenis hejmen li tre koleriĝis. Ekpreninte hakileton de indiano, li hakis la indianojn sur la kapoj, kaj mortigis ĉiujn. Tiam li kaj aliaj viroj prenis pafilojn kaj hakiletojn, transiris al la tendaro de Logan, kaj mortigis la virinojn kaj infanojn. Tio estis terura buĉado. Kiam Logan revenis al sia tendaro, kaj eksciis kio okazis, li rapidis al la aliaj tendaroj de sia popolo, kaj sciigis al ĉiuj pri la terura afero. Komenciĝis tre longa kaj sanga milito. Logan mem havigis tridek skalpojn. Sed la blankuloj mortigis multajn indianojn. Indiano ne timis morton, sed li deziregis eviti la senskalpigadon. Fine oni sendis al la indianoj viron kiun ili amis. Loĝinte kelkajn jarojn inter la sovaĝuloj, li povis paroli ilian lingvon. La gentestroj ĉiuj kolektiĝis en la konsiltendon por aŭskulti la paroladon de la blankulo. Li diris al la estroj ke la ruĝhaŭtuloj kaj blankuloj estas fratoj; ke la milito faras mizeron kaj malĝojon al ambaŭ aroj; ke decas ke la ruĝhaŭtuloj kaj la blankuloj "enterigu la hakileton," kaj loĝu frate unu je la alia. Li diris, "Ni fumu la pipon de paco." Li finis sian paroladon kaj donis sian pipon al la plej proksima estro. Tiu fumis kaj ĝin donis al alia, kaj ĉiuj laŭvice fumis, ĝis kiam la pipo alvenis al Logan. Ĉi tiu malrapide levigis kaj faris paroladon.

Poste la blankulo skribis la paroladon de Logan angle, kaj kiam li reiris al la militaro de sia popolo, li legis ĝin al la estroj. Kredeble ĉiu aŭdanto priploris iun parencon mortigitan de la indianoj, sed la parolado de la kompatinda, maljuna sovaĝulo kortuŝis ĉiujn. Multaj indianoj estis oratoroj, sed la plej bona ekzemplo de la parolarto ĉe la indianoj

estas tiu parolado de Logan. En la dua volumo de "Winning of the West," verkita de eksprezidanto Roosevelt, oni povas legi ĉi tiun paroladon. Ĝi estas la jena:—

"Mi vokas al iu ajn blankhaŭtulo ke li diru, ĉu iam li eniris la kabanon de Logan, kaj tiu ne donis al li nutraĵon: ĉu li iam venis malvarma kaj nekovrita, kaj tiu ne vestigis lin. Dum la daŭro de la alia longa kaj sanga milito, Logan restis senokupata en sia tendaro, kiel amiko de paco. Mia amo al la blankhaŭtuloj estis tia, ke kiam mi pasis, mia popolo almontris al mi kaj diris, 'Logan estas amiko de la blankhaŭtuloj.' Eĉ mi pensis ke mi loĝos kun vi, escepte pro la maljustaĵo

kiun iu viro faris al mi. Dum la pasinta printempo, Kolonelo Kresapo sango-soifanta kaj sen kialo mortigis la parencojn de Logan. Li ŝparis nek miajn virinojn nek miajn infanojn. Ne eĉ unu guto da mia sango fluas tra la vejnoj de vivanta estaĵo. Ĉi tio alvokis min al venĝo, kaj mi elserĉis ĝin. Mi mortigis multajn. Mi tute satigis mian venĝon. Por mia patrujo, mi gojas pri la radioj de paco. Sed ne tenu la penson ke pro timo mi havas la ĝojon. Logan neniam sentis timon. Li ne turnus sur la kalkono por ŝpari al si la vivon. Kiu estas kiu priplorus pri Logan? Neniu."

JOSEPH H. NOBLE.

Nur Knabino

JEN mi kuŝas en bela lulilo. Depost unu horo kaj duono mi estas en la mondo. Silente estas ĉirkaŭ mi, nur de tempo al tempo virino venas al la lulilo kaj montras min al diversaj personoj; ili estas ĉiuj pli grandaj ol mi, kaj parto da ili havas barbon, parto ne havas. Al ĉi tiuj ŝi diras laŭvice, "Ĉu ne vere, bela infano?" aŭ "Ĉu ĝi ne estas ĉarma?" Tiam la koncernatoj ridetas senvole kaj diras: "Tre aminda." Nun ili divenas kiun mi similas. Sajnas ke mia eksterajo konsistas el fragmentoj de diversaj personoj, kaj ke mi efektive posedas nenion propran, ĉar laŭ la aŭdaĵo mi devas kredi ke mi havas la okulojn de la patrino, la frunton de la patro, la mentonon de la avo, dum je mia buŝo multaj membroj de la familio havas rajton. Ion propran mi tre malmulte povis akiri dum mia mallonga ĉeesto.

Nu, tio ne ĝenas min, sed io tedas mian animon. Juna viro staras apud la vizitantoj. Ĉi tiu juna viro estas mia patro, al kiu verŝajne mi estas kaŭzinta malĝojon tre frue kaj senvole. Lia mieno estas malgaja kaj ne ŝercema, kelkfoje li dispremas larmon en la okulangulo. Mi estas scivolema pri la kialo, kaj mi certe esploras ĝin. Nun mia avino venas en la ĉambiron kun vizitkartoj kaj depeŝoj gratulaj, kaj ŝi sciigas la nomojn al la patrino. "Ernst, via patro ankaŭ gratulas," ŝi diras al mi patro. "Kiamaniere la telegramo estas verkita?" li de-

mandas. La avino tralegas: "Nepineto bonvenata, mi kore salutas vin, infanojn ĉirkaŭprenas kicante. Atentu pri la farto de Lilla. Mi venos je la komenco de venonta monato. —Paŭlo."

"Tion mi sciis," diras pesimiste la patro. "Kiom vi estas sciinta?" demandas la avino. "Ke li venos venontan monaton, ĉar li ja skribis antaŭe ke, se la infano estos knabo, li flugos, se ĝi estos knabino, tiam li rampos al mi."

Per atentaj oreloj mi aŭskultas la vortojn, kaj laŭ mia juneca saĝo tiuj vortoj malkovras la misteron. "Ernst," diras avino, "estu prudenta. Vidu, la malfeliĉa Lilla estas tiom malgaja! "Nu, post kelke da tagaj mia ĉagreneto estos malaperinta," diras mia patro; "sed ĉu mi povas mensogi kaj diri ke hodiaŭ mi ne estras min mem? Hodiaŭ la afero tedas min, ĝi ĉagrenas min. Mi ja estis tiom certa pri tiu afero." "Nu ja, ĉar en via familio estas nur knaboj?" Kaj tiam, daŭrigis la patro, "ĉu ne estas ĉagrenige, ke mi tute ne scias je kia nomo mi devas bapti ŝin?" Ĉi tiujn vortojn la patro diris kun korrompanta malespero, kaj nun mi sentas ke mi faris efektive grandan eraron, estante naskita kiel knabino kontraŭ la volo de miaj gepatroj.

La avino estas diligenta defendantino de mia sekso. Si alproksimiĝas al mi, levias mian vualon, rigardas min longtempe kaj diras, "Senkulpa, malgranda vermo, kial vi naskiĝis tia? La patroj estas tiel egoismaj, ili pensas nur al si,

ili preferas filon kiu portos ilian nomon, por ke la nomo, la estimata nomo, la familia nomo, ne malaperu. Ili deziras ke iu ekzistu kiu sukcesos trovi bonan vojon, por ke ilia vanteco povu brili per tio, ke kiam li akiros famon ili povos diri: "Tiu estas mia filo." Sed kiam li fariĝas kanajlo, faros monŝuldojn, kambiotrompajojn, aŭ li estos mortpafita milite aŭ duele? Mi preferas knabinon, tia ja estas tute alia estajo! La filo, kiam li estas preninta sekrete cigaron el la kesto de l'patro, kaj la fumado malsanigas lin, sentas sin kiel perfekta viro; patro kaj patrino ne plu estas liaj edukantoj, kaj apenaŭ li povas atendi ĝis kiam li povos forlasi la patran domon, kiel memstara sinjoro, al kiu neniu povas ordoni. Li fariĝas gasto de la patra domo, lia hejmo estas aliloke. La filino, kontraŭe, ekbruligas la flamon de la gepatra fajrujo. Ŝi vivigas, plibeligas la domon, ŝi gajigas, ŝi varmigas ĝin dum malgajaj horoj. Kiam oni forkondukas ŝin—ĉar oni kondukas ŝin, ŝi ne iras memvole—ŝi adiaŭas per larmoj la karan hejmon, kaj ĉiam ŝi sopiras al ĝi. Sia hejmo estas la gepatra domo, kien ŝi kutimas iri, ankaŭ tiam, kiam ŝi posedas propran mastrumadon. Kaj kiam la gepatroj estas maljunaj, kiu vizitas ilin en ilia soleco, kiu rapidas al ili kiam la plej eta malbono minacas? kiu flegas ilin, kaj estas ilia plej bono helpo? La filino! Kaj tamen oni akceptas ŝin tiom malamike!"

Ĉi tiu parolado, kiu ne malmulte laciĝas mian atenton, estas impresiga por mia patro, ĉar li diras per senkulpiga tono: "Tiamaniere ja mi ne opiniis." Nun ĉio estas silenta, kaj al mi ĉio klara. Nun mi memoras la strangan ekkrion kiun mi aŭdis kiam unufoje mi ekvidis la ĉambron. Oni diris, "Knabino!" Novaj vizitantoj alvenas, ĉiuj estas parencoj. Min oni montras al ĉiuj, kaj multaj rigardas min iom malŝateme, kaj ĉiam ree la bedaŭro, "Domaĝe, ke ĝi ne estas knabo!" Fine, tia malestima traktado tedas eĉ mian patron. Mi observas kun kontento de li nun kontraŭstaras al tiuj diroj. Li kontraŭstaras precipe junan kuzon, kiu estis moke dirinta: "Vidu, Ernst, vi ne rajtis fanfaroni antaŭe tiel multe!" "Nu, nur atentu," respondas patro, "la knabino devas fariĝi fama balregino, viaj junuloj postkuros al ŝi sen-

sukcese." Mi devas konfesi ke ĉi tiu konfido je mia estonta allogeco flatas mian etan animon, kaj pli malpli repacigas min kun la estinta murmurema konduto de mia patro kontraŭ mi. Entute li komencas aliĝi. Ju pli oni incitas lin, des pli fervore li defendas min. Unufoje li eĉ diris ke li estas gaja ke mi estas knabino, kaj uzis la samajn argumentojn, kiujn la avino antaŭe uzis kontraŭ li mem. La viroj estas do burleskuloj, ilia konvinkigo staras parte sur malfortaj piedoj.

Stranga sono venas subite al la lito, kiel mallaŭta, retenata singulto. Ankaŭ la patro aŭdas ĝin, kaj rigardas malantaŭen terurigite. "Kio do estas, Lilla?" li diras rapideme irante al la lito. "Kion mi vidas, ĉu vi ploras? Pro Dio, tio povas malutili al vi!" La patrino ne respondas, la singultado fariĝas mallaŭta, nur de tempo al tempo abrupta sono estas aŭdebla, miksitita kun profunda ĝemo. "Kial vi ploras, infano?" demandas plenzorge la patro. Sed ŝi respondas per nenias vorta. Mia patro parolas petante al ŝi, li alparolas ŝin per ĉiuj karesaj nomoj, sed vane; li ne povas tuŝi ŝian koron. La avino venas en la ĉambron, kaj ekvidas mirigite la larmojn de la patrino. "Mi estas malesperonta," plendas patro; "Lilla ne volas diri al mi kio korprenas ŝin." "Ĉu vi ne estas kapable diveni ĝin?" demandas la avino. "Kiel eble, mi?" "Ĝis nun vi ja ne kisis vian filinon." Li ekleviĝas. "Ĉu tial vi ploras, Lilla?" Rapide li venas al mia lulilo, levas min el ĝi, kaj portas min al la patrino el kies okuloj nur amo, fiera amo brilegas pri mi. Per tia esprimo ĝis nun neniu rigardis min. Mi sentas la buŝon de patro, ĝi iomete tiklas min, dum li diras: "Mia amata, malgranda knabineto!" Li kisas min tiel forte ke lia barbo pikas min, kaj mi devas plori. "Pro Dio, vi ja mortpremas ŝin!" diras la patrino; "donu ŝin al mi." Kaj oni metas min tute proksime apud ŝi sur la silkan litkovrilon. La patrino rigardas min longe, longe; kaj tial mi devas ĉesigi la ploradon. "Ĉu vi estas feliĉa?" demandas mallaŭte patrino. Kaj la patro kisas ŝin kaj respondas, "Mi estas feliĉa."

El la germana tradukis

HANS BÖNING,
Stuttgart, Germanujo.

Nokto de Julio

(*Ci tiu originala rakonto gajnis la premion en "konkurso 22" (proponita de S-ro Edwin C. Reed), okaze de la literatura konkurso de la Sepa internacia Kongreso de Esperanto. Pro eraro, oni anoncis ĝin kiel la duan premion de "konkurso 2."*)

DUM vespero de la lasta vintro, kunvenis ĉe mi kelkaj esperantistaj studentoj. Ni diskutis pri la progreso de la internacia lingvo, kaj la proksimeco de ĝia sukceso. Tio instigis nin rakonti kiel ni estis al Esperanto varbitaj: unu fariĝis adepto ĉar li okaze ĉeestis la ĝenevan kongreson; alia, kiu konfesis sian longtempan mokadon, konsentinte legi gramatikecon, estis subite algajnita; tria komencis la lernadon por plaĉi kuzinon; ĉiu el ni diris sian historieton. Sole Roberto, filozofia studento, daŭre silentis. Mi rimarkis tion kaj diris al li, "Kaj vi, Roberto, kiel vi esperantiĝis?" Vi sola ne parolis ankoraŭ."

Alvokite, Roberto per mano gestanta signifis ke li ne rememoras plu. Sed mi insistis:

"Tio estas neebla, mia kara! Nur de kelke da monatoj vi enviciĝis sub nia standardo. En la lasta julio vi venis al ni. Kaj mi rememoras tre bone pri tio: de la novaj varbitoj ofte granda estas la fervoro, sed mi neniam vidis fervorulon kiel vi. Jus varbite, vi volis entrepreni ĉirkaŭvojaĝon por paroladi; kaj propramove,—maloftaĵo,—vi pagis duoblan kotizajon. El kie venis al vi tia pasio? Mi vetus ke vi povas al ni rakonti la plej frapantan okazintaĵon. Tiel instigite, la junulo ridetis iom embarasite, kaj diris:

"Eĥektive la mia estas sufiĉe stranga historio. Sed se mi ripetus ĝin, mi ŝajnus al vi superstiĉulo."

Ni protestis: ni estis ĉiuj bonaj esperantistoj; tute malprave li timiĝis; neniu el ni ŝercus samideanon pro lia fervoro.

"Promesu al mi ke vi ne rediros ĝin al iu ajn, nomante min."

Nur post kiam li estis ricevinta promeson, li fine bonvolis rakonti al ni la strangan aventuron jenan:

Gi okazis en la lasta julio. Mi estis

pasiganta unu semajnon en Parizo por ekzamenoj. Tiu afero, ĉiam laciga, estis ankoraŭ tiun jaron pli premanta ol kutime, pro la neordinara varmo de l' somero. En la sabato de la ekzameno pri grekaj filozofioj, mi estis tradukinta la mirigan platonan verkajon en kiu iu armeniano rakontas ke li trapasis, tute vivanta, la mondon inferan, kaj ke li el tie revenis por klarigi al la homoj kio okazos post la morto. Dimanĉon, por ripozi, mi iris en la aviadkampon. Ne ankoraŭ vidinte aviadistojn, mi estis tre videma pri la nova mirinda sporto."

"Sed tiun dimanĉon," mi diris, "mi akompanis vin en la aviadkampon, ĉu ne?"

"Jes, kaj tre ofte dum la tago vi parolis al mi pri Esperanto. Vi diris ke ĝi estas la plej granda homara afero de nia tempo. Apenaŭ mi povis silentigi vin kiam forflugis aviadisto. Mi devas al vi konfesi ke plej ofte nur ŝajne mi aŭskultis vin: mi estis satigita de studoj, kaj mia sola dezirego estis enkampariĝi kaj forlasi la librojn, libere rigardi dum du libertempaj monatoj la arbarojn kaj la bestojn. El la aviadkampe ni revenis malfrue en mian hotelon; kaj lundon, frumatene, mi eniris la vagonaron kaj forlasis Parizon. Pardonu al mi ĉi tiujn detalojn, ili estas necesaj por ke vi komprenu la okazintaĵon.

"Mi do estis tre laca je alveno, lundon vespere, en la patran kamparan domon. Tuj post la vespermanĝo, mi supreniris en mian ĉambron, intencante tre frue kuŝiĝi por regajni iom da dormo. Sed tiel bela estis la nokto, tiel bonodora la freŝa aero, kiun blovigis al mi la proksima arbaro, ke mi ne povis kontraŭstari al mia deziro: alproksimiginte mian apogseĝon antaŭ la fenestron malfermitan, mi sidiĝis por fumi cigaredon. Mi sentis min en ripozo, mi sekvis per la okuloj la blankan nebuleton el mia cigaredo; tute malplenigita de pensoj estis mia cerbo, mi ĝuis la silenton de la kamparo kaj la mallumon de la nokto. Tiam okazis al mi mirindaj aventuroj:

"Subite mi sentis min rapide forportita. Uragano skurĝis mian vizaĝon. Mi ĉirkaŭrigardis. Mi sidis sur benketo, kun

du personoj kiujn mi ne konis. Antaŭe kaj malantaŭe estis du aliaj benketoj; sur ĉiu sidis kvar personoj; ĉiuj vizaĝoj estis de mi nekonataj. Terura ronkado bruigis la aeron. Super ni estis lumbrilega ĉielo. Dekstre, iomete super mia kapo, etendiĝis sola, larĝa plato, streĉita de metala armaturo. La benketoj estis lokitaj en profunda kestego kies pario alte staris ĝis mia ŝuldro. Inter la tolo kaj la supera bordo de la pario estis spaco sufiĉe larĝa, tra kiu la rigardo libere pasis. Leviĝinte, mi kliniĝis dekstren por rigardi, sed rapide mi residiĝis pro kapturigo; tra la spaco mi estis vidinta arbarojn kaj vilaĝojn, valetojn kaj montetarojn, tutan landon kiu ŝajnis forgliti kun terura rapideco. Mi ne dubis plu: mi estis en aeroplano. Kiam, kaj kie mi estis ĝin enirinta mi vane penis rememori. Post multa hezito mi tuŝis per fingro la ŝultron de la vojaĝanto sidanta antaŭ mi.

“Ĉu vi bonvolas, sinjoro, diri al mi kien ni flugas?” Li turnis la kapon kaj per mirigitaj okuloj rigardis min.

“‘Certe,’ li diris, ‘estas tempo ke vi sciigu pri tio. Vidu la surskribon malantaŭ la seĝo de l’pilot.’”

“Nur tiam mi rimarkis sur izolita seĝo, antaŭ la vojaĝantoj, okan personon, kun galonumita ĉapo. Sur la dorsapogilo mi legis ĉi tion, per grandaj nigraj literoj skribitan:

“Aerobuso numero 25a. Liono, Dijono, Parizo. Rapidegaj vojaĝoj.

“Mi estis stultigita. Sed por diri ion al mia kunvojaĝanto, kiu daŭre rigardis min, mi parolis al li pri la rapideco de nia veturado. Li forprenis el sia buŝo la pipon kiun li fumis, kaj trankvile kvazaŭ tio estas tute ordinara: “Jes,” li diris, “l’aerobuso flugas bone. Certe ni trakuras tricent kilometrojn po horo.” Kaj tiel kvieti li ŝajnis ke mi ne kuraĝis esprimi mian timon. Tamen mi tremegis pro teruro; mi antaŭsentis, mi certiĝis ke mi baldaŭ defalos.

“Efektivigis mia antaŭsento. Baldaŭ sur la horizonto aperis nigra barilo el nuboj; komence, je la montetoj, rapide ĝi leviĝis kiel giganta, nokta muro; post kelkaj momentoj ĝi invadis duonon de la ĉielo. Nia aeroplano rapidis al ĝi. Dufoje per fingro tuŝinte la ŝultron de mia kunulo, kiu daŭris fumi sian pipon, mi

montris al li la nigran amasegon, kiu senĉese pligrandiĝis. Li ridis pro mia timo.

“‘La unuan fojon, sendube, vi aeroplanas,’ li diris; ‘ĉio mirigas kaj timigas vin. Kio estas tio? Kelkaj nuboj. Post kvin minutoj ni estos traflugintaj ilin. Apenaŭ li parolis, kiam ni involviĝis per densega nebulo, je diabla bruego plena, kaj traborita de fulmofajra lumo. Mia najbaro kliniĝis al mia orelo kaj kriis: ‘Fulmotondro. Vidu kiel tio estas bela.’ Pasis ankoraŭ unu minuto. Tamen la piloto, super la kompasoj klinita, ŝajnis malkvieta. Li forte altiris la levilojn; skuo jetis min kontraŭ la dorsapogilojn de la benketoj. Videble li penis pli surpriniri.

“Subite, pli terura ol ĉio antaŭa, blindiganta lumo superverŝis nin. Mi vidis la piloton batantan la aeron per brakoj; kaj mi mem tiel forte skuigis ke ŝajnis al mi ke miaj membroj estas disrompitaĵoj. La vojaĝantoj falis unuj sur aliajn. Mi vidis buŝojn kriegantajn pro teruro, sed tiel granda estis la bruego ke mi ne aŭdis la kriegojn. Poste, mi sentis ke ni faladis kun kapturiganta rapideco. Intermiksate, la vojaĝantoj alkroĉiĝis je la benketoj. La piloto, kiu estis sendube fulmofrapita, falis el sia seĝo. Ĉio tio daŭris apenaŭ kelkajn sekundojn; kaj en granda frakasado de ŝtalaj rompantaĵoj, kaj de disŝiritaj eroj, ni tuj estis dispremegetaj sur la teron.

“Mi ne scias kiom da tempo mi estis nekonscia; sed kiam mi rekonsciigis tute nova spektaklo aperis antaŭ miaj okuloj. Meze de supernature verda herbejo, en fundo de mallarĝa valetoj, ĉirkaŭfermita de abruptaj montoj kies supraĵo perdiĝis en ĉielo, staris granda tablo kovrita per verda tapiŝo, kaj provizita per kompleta skribilaro. Malantaŭ ĝi, sub ledaj apogseĝoj, sidis tri gravaj sinjoroj, grizbarbaj kaj senharaj. Ili estis vestitaj per nigraj jakoj, kaj rigardis kun severa mieno malgajan junulon antaŭ ili starantan. Ĉirkaŭ kaj malantaŭ mi estis multaspekta amaso da personoj, maljunuloj kaj junuloj, bele ornamitaj sinjorinoj kaj ĉifonvestitaj malriĉulinoj. Sur la herbejo sidis infanoj ludantaj; malgrandulo ploris, alvokante sian patrinon. Vidante la tablon kaj la tri sidantojn, mi pensis

dum momento ke mi estis reveninta antaŭ mian ekzamenan juĝantaron. Sed tio estis nebla. Mi penis liberigi kaj antaŭeniri, sed pedelo prenis min je l'brako, kaj revenigis min.

“‘Vi antaŭeniros je via vico,’ li diris. Mi penis diveni kie mi estas. Esplorante per okuloj la fundon de l' valetto, mi ekvidis du gigantajn pordegojn; unu estis malhela, kaj ŝajne kondukis al malluma tunelo; la dua, interne lumigita, ŝajnis plena je lazura lumo. Mi pli kaj pli malcertiĝis, kiam mi rimarkis super ĉiu pordego grandan surskribajon: super la maldekstra mi legis, ‘infero;’ kaj super la dekstra, ‘elizeaj kampoj.’ Subite heliĝis mia penso, kaj mi komprenis ĉion. Mi estis mortinta. Tiu juĝantaro estis tiu, pri kiu estis skribinta Platono. La tri juĝistoj estis Eako, Minoso kaj Radamanto, de Zeŭso nomitaj por juĝi la homojn. Tuj juĝota mi mem estis, keĵ eble eljetota en Tartaron. Rapide mi ekzamenis mian vivon, tra miaj ostoj pasis tremfrosto. Mi memoras ke malgraŭ mia timo, iomete mirigis min la jakoj de la juĝistoj. Sed mi ne havis tempon por mediti pri tio. Rapidemaj estis tiuj juĝistoj. Baldat' venis mia vico, kaj la pedelo alvokis min. La antaŭiranto estis sendube kondamnita, ĉar li eljetis terurajn kriojn kaj malespere batalis du policianojn kiuj perforte fortiris lin al la malluma pordego. Mi tremante alproksimiĝis, kaj mi pensis, ‘se nur mi ankoraŭ estus antaŭ la teraj juĝantaroj, kiujn mi antaŭe tiomfoje malbenis.’ Minoso prezidis; kiam mi venis li rigardis min per senmovaj okuloj, kiuj la tutan animon esploris.

“‘Vian nomon diru,’ li ordonis kavernavoĉe.

“‘Roberto,’ mi respondis.

“‘El kie vi venas?’

“‘El Francujo.’

“‘Eako vin juĝos. Lin Zeuso komisiis por ekzameni la eŭropajn mortintojn.’

“‘Mi faris paŝon dekstren por prezenti mi nal Eako; Minoso per signo farita al la pedelo alkondukigis alian animon. Eako rigardis min bonvole. ‘La sorto favoras vin,’ li diris. Lia voĉo estis basa, sed agrabla. Ĝi resonis kiel tiuj violoncelaj notoj kiuj vibrigas la bruston. Mi sentis min rekuraĝigita. Post momento li daŭrigis: ‘Mi jus ricevis de Zeŭso komision. Li ne permesas ke ni juĝu

vin. Lia volo estas ke vi libere vizitu la landon de l' mortintoj, kaj ke vi poste reiru al la vivantoj por rakonti al ili vian vojaĝon. Tro ofte ili forgesas nin. Estas utile ke de tempo al tempo komisiito estu al ili sendita: vi estos tia sendito. Tiel decidis Zeŭso, patro de l' homoj kaj dioj.’ Li silentis. Mi kliniĝis profunde, kaj demandis:

“‘Kiu gvidos min en tia vojaĝo?’

“‘Mi prizorgis tion,’ li respondis; kaj turnante sin li montris al mi du personojn, kiuj jus eliris el la lazura pordego. Poste, ĉar Eako estis invitinta min al tio, mi pasis malantaŭ la juĝantaro, por iri renkonte al ili. Mi videme rigardis la du venantojn. Unu estis juna, lazurevestita, tre bela, kun luksa hararo ondanta sur liaj ŝultroj, kaj li havis du flugilojn falditajn, kiel la anĝeloj sur la mezepokaj pentraĵoj. La dua, per kamparana, blua kitelo vestita, korpe ankaŭ vigla kaj fortika, havis maljunulan kapon, grizan barbon kaj blankan hararon. Vidante lin, mi ekemociiĝis. En la profundo de mia memoro, mi sentis ekvekiĝantajn vidaĵojn, inter kiuj moviĝis simila formo. Mi revidis min, dekjaran infanon, en kampara ĝardeno, antaŭ vilaĝa dometo.

“‘Alproksimiĝante, la maljunulo ridetis al mi, kaj mi ekkriis: ‘Avo mia!’ Mia avo, ĉar efektive tiu estis li, malfermis al mi siajn brakojn, kaj ni tenis nin, unu la alian, longtempe ĉirkaŭbrakitajn.

“‘Granda estas mia feliĉo,’ li diris fine, ke vi rekonas min. Vi amis min multe, dum mia vivo, kaj vi estis tute ĝentila knabeto.’ La anĝelo estis malaperinta. Al la muta demando, kiun li legis en miaj okuloj, mia avo respondis ke la misio de la anĝelo estas finita, ‘Li rakontis al mi vian aventuron kaj la sorton kiun Dio al vi difinis; li reiris en la ĉielon. Al mi nun estas komisiita, por ke mi vidigu al vi la diversajn landojn de la mortintoj. Venu.’ Mi kisis lin unufoje ankoraŭ, kaj obeeme marŝis flanke de li. Irante, li petis de mi sciigojn pri mia patro kaj la tuta familio. Mi miris je lia nescio.

“‘Ĉu vi neniam ricevas informojn pri la vivantoj, avo?’

“‘Malofte, mia filo. La ĉielo estas tiel vastega, kaj la elektituloj tiom multaj! Nur tiuj kiuj estis kunligitaj inter si sur tero estas en ĉielo proksimiĝitaj kaj

rekonas unu la alian. De la alveno de via avino mi nenion scias pri vi ĉiuj, sur tero, miaj karuloj.'

"Tiam mi vidis ke ni estis alvenintaj antaŭ la malluma pordego. Ruĝvestitaj pordistoj, similaj al tiuj kiuj estis perforte fortrenintaj la kondamiton, are sidis sub profunda arkajo. Ree mi ektimigis.

"Mi timas, avo,' mi diris; 'kiel vi povos gvidi min en la inferan regionon? Ĉu vi konas ĝin, vi, loĝanto de l' ĉielo?'

"Ne timu, facila estos mia tasko kaj la via. Sufiĉos, laŭ la komiso de l' anĝelo, ke ni kune faru kelkajn paŝojn sur la stratego kiu kondukas en la landon de malfeliĉeco. Kaj nur ĉi tio estas al vi postulata, ke vi certigu antaŭ la homoj, la veron forgesitan de ĉiuj, kiun rakontas la antikvaj libroj.' Al pordisto mia avo montris signon, kaj la ruĝa estaĵo flankeniris, por lasi al ni liberan vojon."

Roberto paŭzis kaj ĉirkaŭrigardis nin. Ni ĉiuj estis atentaj. Vidante kiom plaĉis al ni lia rakonto, li daŭrigis ride-tante:

"Sendube de tiu, kiu transiris la sojlon de la infero, vi esperas terurajn priskribojn; ekvekiĝas en via memoro la timegindaj vidaĵoj de Dante'o. Kredeble mi trompos vian esperon, sed mi devas rakonti mian sonĝon tian, kia ĝi estis. Dum sufiĉe longa tempo ni ambaŭ marŝis, tenante nin reciproke je la mano, en la malluma tunelo, kiu rapide profundigis interne de la monto. Poste, ni alvenis sur ian terason, super kiu erektiĝis kiel netransiribla muro, la flanko de la monto. Antaŭ ni etendiĝis senlima ebenaĵo. Griza estis la ĉielo, griza la tero, grizaj la domoj, kiuj tra vintraj nebuloj aperis en la nuda kamparo. Glaciiga malsekaĵo penetris min; vastega kaj samtona ĝemaro ondiĝis en la aero; mi tremetiĝis pro frosto kaj timo. Mia avo prenis mian manon kaj diris; 'Ni ne iros pli antaŭen.'

"Kie estas la fajroplenaj kavegoj en kiuj brulas la kondamnitoj? Kie estas la diabloj, kiuj ilin turmentas?'

"Ĉiuj turmentegoj ekzistas nur en la imago de homoj. Nur unu turmento estas en la lando de mallumo, kaj tiu, kiu spertis ĝin, diras ke ne povas esti io pli terura. Ĉiu kondamnito, transirante ĉi tiun sojlon, ricevas tutan kaj plenan komprenon de la malbono farita de li. Tia

puno plene sufiĉas, ĉar lando kaj ĉielo harmoniiĝas kun la maldolĉeco de l' animoj: nek suno en ĉielo, nek verdaĵo en la kamparo, nek ĝojo en la koroj. Aŭskultu la ĝemadon, kiu suprenvenas el la valo: la malfeliĉuloj elkrias siajn konscienciprocojn, kaj ploras pro la perdita sunlumo.'

"Pri tiuj malfeliĉuloj, avo, ĉu estas nenia savado esperebla?'"

"Mia filo, de l' alveno de l' Kristo sur teron, ne estas plu eternaj kondamnitoj. Kiam venos la tempo, ĉiuj tiuj animoj reiros en la mondon, por ree enkorpiĝi kaj ree provi la grandan aventuron de l' vivo.'"

Roberto fermis la okulojn, sendube por pli bone revidi la strangajn spektaklojn.

"Pri tiu punkto,' li aldonis, 'estas manko en miaj memoroj aŭ en mia sonĝo. Mi ne rememoras la revenon tra la tunelo, nek la retrapasadon tien, kie sidis la juĝistoj. Mi retrovis min sub granda, lumplena ĉielo, en herbeja spaco en mirinda arbaro Flanke de mi estis ankoraŭ mi avo, kaj per mano li montris al mi, sub grandaj arboj, funde de ĉarma kampara ĝardeno, pajlokovritan dometon, per multkoloraj floroj ornamitan. Ĉu vi rekonas ĉi tiun domon?' li demandis. Pro miro grandiĝis miaj okuloj.

"Jes, avo mia. Ĝi estas via malnova dometo, ĉi tie estas ankaŭ la ĝardeno kie mi ludis dum mia infaneco. Kiom ili ambaŭ estas beletaj, kaj ŝajnas rejunitaj!'

"En la ĝardeno estas via avino. Iru ni por renkonti ŝin.' Mi sentas ankoraŭ sur miaj vangoj la amplenajn kisojn de la bona maljunulino. Sed mia ĝojo ne malaperigis mian miron. Mia avo klarigis al mi:

"Por la bonuloj kiuj estas ricevitaj en la elizeajn kampojn, nur tio estas komuna, ke ĉiuj estas ŝirmitaj kontraŭ malsano kaj bezono. Sed ili elektas la vivmanieron kiu al ili plej plaĉas. Via avino kaj mi ne povas imagi pli grandan feliĉon ol daŭrigi nian antaŭan kunvivadon en nia dometo florumamita kaj sunlumigita. Kaj ni loĝus ĉi tie, ĝis la momento kiam Dio realvokos nin al la vivo.'

"Kion vi diris, avo? Vi ankaŭ renaskigos kaj ree vivos?'

"Jes, filo mia; tia estas la leĝo. Ne estas ankaŭ eterna ripozo. Ĉiu animo,

laŭvice, devas reeniri la batalantan vivon, kaj alporti novan penadon al la mondo.' "

Roberto skuis la kapon, ŝajne por forĉasi la tro multnombrajn memorojn, kaj diris: "Mi ellasos multajn detalojn kiuj ne interesus vin, ĉar vi demandus de mi, kiel mia stranga historio rilatas Esperanton. Sajnas al mi ke mi pasigis multajn horojn, aŭskultante la klarigojn de mia avo. Sed en tiu feliĉa lando ne ekzistas la nokto, kaj mi ne scias kiom da tempo forflugis. Fine mia avo fortiris min per mano:

"Venu. Mi devas rapidi. Alproksimiĝas la momento kiam vi reiros sur la teron; kaj antaŭe estas necese ke mi montru ankoraŭ al vi la Templon de la Saĝuloj.' Tra la mirinda arbaro ni ekiris, kaj dum la marŝado mia avo daŭrigis mian instruadon. 'Nur tiuj estas ricevitaj ĉi tie, kiuj en iu ajn punkto laboradis por la homa progreso. Tia estas la leĝo. Kaj la elektitoj estas honorataj kaj feliĉigataj proporcie kun siaj servoj. Vi do, mia malgrandulo, ŝparu nek tempon nek penon nek monon por helpi, laŭ via povo, la homan progreson, kaj ĉiun aferon kiun ĝin antaŭenpuŝas. Tia estas via devo.' Tion aŭskultante, mi ne povis deteni min de penso, kiun mia avo legis en miaj okuloj. 'Jes, mia filo, mi divenas vian penson, kaj mi ankaŭ miris, kiam anĝelo klarigis al mi la leĝon, kaj mi demandis kial mi estas ricevita, mi, kiu estis nescianta terkulturisto, kiu eble neniam zorgis pri la progreso, kaj kies tuta vivo disvolviĝis en la humila rondo de kampo kaj ĝardeno. Sed la anĝelo montris al mi miajn nekonitajn indaĵojn: mi ĝoje faris mian terlaboron; mi amis la justecon; kaj mi havis kvar infanojn, kiuj, pro miaj penoj, estas pli bonaj ol mi, korpe kaj spirite. Mi, do, ankaŭ laboris por pli nobla homaro, kaj mi komprenas nun ke tio ankaŭ estas nobla kaj meritplena tasko. Sed ĝi ne sufiĉas por tiuj, kies pli granda sciado trudas pluaĵn devojn. Pro tio, mi donis al vi, juna scienculo, la antaŭajn konsilojn.'

"La subarba vojeto sur kiu ni marŝis subite malfermiĝis je granda kaj bela herbejo, kie arbaretoj estis dissemitaj. Mirinda blankmarmora palaco limigis ĝin je la kontraŭa flanko, kaj etendiĝis ĉirkaŭ ĝi, kiel brakoj malfermitaj. Sur la herbejo kaj sub la portikoj de la palaco,

homoj arete promenis kaj interparolis. Momente ni haltis. 'Jen estas,' diris mia avo, 'la Templo de la Saĝuloj. Ĉi tien Dio kunigas ĉiujn, kiuj faris al la homaro ian grandan servon: scienculojn kiuj eltrovis novajn veraĵojn kaj pligrandigis la homan potencon; artistojn kiuj konigis iun formon de l' belo, kaj plinobligis la animojn de siaj kunvivantoj; filozofojn kiuj pripensis la gravajn problemojn de l' homa sorto, kaj lernis kiajn agadojn postulas la eterna justeco. Ĉiuj, post la morto, kunvenas ĉi tien, kaj loĝas en tiu palaco, centre lokita en la elizeaj kampoj. Mi kelkfoje venas ĉi tien por promeni. Ili permesas ke oni aŭskultu ilin. Vi ne imagas kiel feliĉaj ili estas, renkontiĝante el ĉiuj lando kaj jarcentoj, por interparoli pri sia komuna idealo. Sed venu ĝis tiu proksima arbareto kie tri el ili sidas, interparolante. Ni ripozos, aŭskultante al ili.' Ni ambaŭ sidigis en arbombro, je respektama interspaco. Ni povis tamen aŭdi iliajn parolojn, sed la tri saĝuloj silentis. 'Mi rekonas ilin,' diris mia avo; 'ili estas nomitaj inter la plej famaj herooj, kiuj antaŭen movis la homan rason. La plej fortika, tiu kies nuda korpo apenaŭ estas kaŝita de bestaj peltoj, estas la antikva eltrovinto de l' parolo; li unue havis la ideon signifi objektojn per vortoj. Dekstre de li, sidas la elpensinto de la muziko; vidu, li havas liron apud si. La tria, kiu apogas la dorson kontraŭ arbo, elpensis la skribarton. Oni diris al mi iliajn nomojn, sed ili tiel strange sonas ke mi ne povas ilin memori.'

"'Ili ne ŝajnas esti tre parolemaj, tiuj elpensintoj de l' parolo kaj kanto,' mi diris al la avo.

"Ridetiĝis mia avo kaj klarigis: 'Ili ĝuas la revidon de l' elizea lumo kaj de la sanktaj arbaroj. Nur malofte ili revenas ĉi tien. Ilin sendis Dio sur aliajn planedojn por konigi al la loĝantoj la esprimrimedojn, kiujn ili elpensis por la teranoj, plenumonte tie mision similan al tiu, kiun ili sukcese faris sur tero.'

"Post momento da silenta pripensado, mi faris al mia avo demandon: 'Ĉu vi ne opinias, avo, ke Gutenberg'o meritus esti kun ili?'

"'La elpensinto de l' presarto? Mi ankaŭ pensis tion, kiam la unuan fojon mi vidis ilin. Sed oni klarigis al mi ke

Gutenberg'o, post longa ĉi tiea loĝado, reenkorpiĝis sur tero por kompletigi sian laboron.

“Kiamaniere? Ĉu li estus la elpensinto de la novaj presmaŝinoj, kiuj estas uzataj de la gravaj ĵurnaloj?”

“Ne, la heroo, kiu tion klarigis al mi, parolis pri multe pli grava afero. Per parolo la homoj povas esprimi unuj al la aliaj siajn pensojn; per skribarto la pensoj povas esti transdonitaj al la plej malproksimaj, kiel ankaŭ al sia posteularo; per presarto ili povas esti dissenditaj al milionoj da legantoj. Sed kontraŭ la disvastiĝado de la homaj pensoj estas ankoraŭ forta, lasta barilo; la multdiverseco de la lingvoj. Por ĝin malaperigi, Gutenberg'o reenkorpiĝis.”

“Sed kiu rimedo povus faligi tian barilon?”

“La elpensado de tutmonda helpa lingvo, pli perfekta kaj pli simpla ol ĉiuj ekzistantaj lingvoj, kiun ĉiu homo povus facile lerni. Eble la laboro estas jam komencita. Ĉu vi aŭdis nenion pri tio? Tiam mi rememoris kaj rakontis al mia avo ĉion, kion vi, la antaŭan dimanĉon, diris al mi pri Zamenhof kaj Esperanto. Li aŭskultis atente. ‘Kaj tiu pola doktoro estas modesta kaj mildanima? Li parolas pri la frateco de l' homoj, kaj la precipa devo de la homa interamo?’

“Tion diras liaj disĉiploj.”

“Sendube, do, tiu estas li, Gutenberg'o. Ne flanke lasu la okazon kunlabori por granda kaj sankta afero. Donu al ĝi iomete da penado kaj da mono. Se vi faros tion, mi certigas al vi, kiam vi revenos antaŭ la juĝistaro de la terura vojkruĉiĝo, vi ne estos enkalkulita inter la malfeliculoj, kies vivo estis senfrukta aŭ malprogresiga. Tiel emociplene parolis mia avo, ke mi estis profunde tuŝita en la koro. Mi promesis al li obei liajn konsilojn.

“De kelke da tempo, supernatura lumo

etendiĝis en ĉielo, supre, de la kupolo de l' templo. Tio estis kvazaŭ grandega glorkrono kies brilo senĉese plilumiganta grade fariĝis netolerabla por la okuloj. La tri herooj estis stariĝintaj. Mia avo surgenuiĝis. ‘La ĉielo festas revenon de saĝegulo,’ li diris. ‘Rigardu, tuj videbliĝos la vizaĝo de Dio!’ Mi rapidis por ankaŭ surgenuiĝi, sed ĝuste tiam mi sentis fortan frapon sur la frunton, kaj mi vekigis.

“Rekonsciiginte, mi trovis min flanke kuŝinta sur la pargeto; mi estis elfalinta el mia apogseĝo, kaj mia frunto estis alfrapiĝinta kontraŭ l' apogilon de la fenestro. La plenluno brilis meze de la ĉielo, kaj lumo superversis mian ĉambiron. Mia kapo zumadis interne, kaj de kruela doloro estis premataj miaj tempioj. La dormo estis forlasinta min. Longe mi pripensis ĉiujn detalojn de mia stranga sonĝo. Por pli bone memori, mi tuj notskribis ilin, dum al miaj oreloj ŝajnis ankoraŭ soni la voĉo de mia avo. Ofte de tiu tempo mi relegis tiujn paĝojn, kaj preskaŭ parkere mi rakontis ilin al vi. Du tagojn poste, mi sendis al via grupo mian aliĝon. Jen estas kiel mi fariĝis esperantisto.”

Silentis Roberto. Ni ĉiuj ankaŭ momente silentis, meditante pri la gravaj ideoj esprimitaj de li. Fine mi diris: “Tute malprava vi estis, kara amiko, rifuzante rakonti vian historion. Ĝi ne estas vulgara, kaj inter la esperantistoj estas malmultaj, mi vetus, kiuj estis varbitaj al Esperanto per la klopodo de avo mortinta, dum vojaĝo en elizeajn kampojn. Mi rakontos ĝin al la legantoj de AMERIKA ESPERANTISTO.”

“Tio estu,” diris Roberto; “sed ne nomu min per mia vera nomo.”

Trankviliĝu pri tio, Roberto, vi ricevis mian promeson.

B. BEAU,
Maçon, Francuj

46613

Handwritten signature or mark.